



BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA
DE ESPERANTO



XLI-A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

MURCIA, 17-22 JULIO 1981

**Nuestro especial agradecimiento al:
EXCMO. AYUNTAMIENTO DE MURCIA**

Expresamos nuestro agradecimiento
a las siguientes entidades:

CAJA DE AHORROS PROVINCIAL DE MURCIA
CONSEJO REGIONAL DE MURCIA
UNIVERSIDAD DE MURCIA
CAJA DE AHORROS DE ALICANTE Y MURCIA
DELEGACION DE CULTURA



D-ro L. Ludoviko ZAMENHOF, genia kreinto de la Internacia Lingvo Esperanto.

BYALISTOCK 15-an decembro 1859-a

VARSOVIO 14-an aprilo 1917-a



SALUTO KAJ BONVENO

Unu plian jaron, la hispanaj geesperantistoj havas okazon partopreni en Nacia Esperanto-Kongreso, kaj mi profitas la okazon por saluti vin ĉiujn el la paĝoj de ĉi tiu Kongreslibro.

La XLI-a Hispana Esperanto-Kongreso proponas al ni, dum nia restado en Murcia, belan kaj allogan programon, kiu enhavas interesajn kulturajn aranĝojn, kiel Seminarion, laborkunsidojn, du prelegojn, vizitojn al kelkaj Muzeoj, esperantajn filmojn k. t. p., kaj variajn gajajn programerojn.


La celo de Esperanto-Kongreso, tiel, estas multflanka: Labori kun la celo plibonigi nian esperantkapablon kaj nian propan hispanan E-Movadon, renkontiĝi kun niaj konatoj, intersanĝi niajn spertojn, kaj aliflanke koni la urbon, kontakti kun la naturbeleco de la regiono —pere de la du programitaj ekskursoj— k. t. p.

Fakte, la kultura diverseco en nia lando konsistigas grandiozan fonton de riĉaĵoj kaj valoroj. Tiu interŝanĝo de kulturoj estas ĉiam enhavoriĉa kaj necesa, kaj la murcia regiono, en tiu senco, proponas al ni en ĉiu artmonumento, en ĉiu horto, en ĉiu fruktĝardeno, en ĉiu folkloro prezentado, etan vidaĵon de tiu grava sudorienta hispana kulturo.

Kun fido en nia nobla celo kaj kun la espero ke per nia komuna laboro ni sukcesos disvastigi Esperanton en la tuta lando, mi deziras al vi agrablan restadon en Murcia kaj aktivan partoprenon en ĉiu programero.

M. R. URUEÑA

(PREZIDANTINO DE HISPANA ESPERANTO FEDERACIO)



BONVENON AL ĈIUJ GEPARTOPRENANTOJ

Estas por mi granda honoro kaj motivo de fiereco la fakto ke oni konfidis al mi la prezidantecon de la Organiza Komitato de la 41-a Hispana Esperanto Kongreso.

Mi estas plene konvinkita ke unu el la plej gravaj obstakloj por la tutmonda paco kaj por pli bona kunvivado inter la homaro estas la diferencigaj faktoroj de la lingvoj, kaj ke Esperanto estas la plej taŭga ilo por atingi pli ĝustan kaj unuecan homaron.

Ni faros ĉion eblan por tiu ĉi celo en ĉi tiu Kongreso okazanta en la akceptema urbo Murcia, kie ni klopodos per ĉiuj rimedoj ke via restado ĉe ni estu agrabla, gaja kaj fruktodona.

Ĉiumomente mi estas je via dispono.
Saluton kaj bonvenon.

A. SERNA SERNA
(Katedra Prof. pri Kemia Fiziko en la Universitato de Murcia)
PREZIDANTO DE L. K. K.

COMITE DE HONOR DEL 41 CONGRESO NACIONAL DE ESPERANTO

- Magnífico y Excmo. Sr. D. JOSE LOZANO TERUEL
Rector de la Universidad de Murcia (Presidente de Honor del Congreso).
- Excmo. Sr. D. JUAN JOSE ROSON
Ministro del Interior.
- Excmo. Sr. D. JUAN A. ORTEGA DIAZ-AMBRONA
Ministro de Educación.
- Excmo. Sr. D. IÑIGO CAVERO LATAILLADE
Ministro de Cultura.
- Excmo. Sr. D. PIO CABANILLAS GALLAS
Ministro de la Presidencia.
- Excmo. Sr. D. MANUEL COBO DEL ROSAL
Secretario de Estado de Universidades e Investigación.
- Excmo. Sr. D. ELOY IBAÑEZ BUENO
Secretario de Estado para el Turismo.
- Ilmo. Sr. D. MARIANO LOPEZ ALARCON
Catedrático de Derecho Canónico y Director del I. C. E.

COMITE ORGANIZADOR

- Presidente:
D. Antonio Serna Serna (Catedrático de Física Química)
- Vicepresidente:
D. Francisco Miguel Muñoz Garre.
- Secretario:
D. Florián Morales López.
- Tesorera:
Doña Eduvigis Muñoz Garre.
- Vocales:
D. José María Bernabeu Franco
D. Francisco Javier Ortiz
Srta. Puri Gallego Sánchez
Srta. Mari Carmen Tovar Moreno
Srta. Rosa María Navarro González.

ESTRARO DE LA HISPANA ESPERANTO FEDERACIO (H. E. F.)

Prezidantino: D-rino MARIA RAFAELA URUEÑA ALVAREZ
Vicprezidanto: S-ro ANGEL DIEZ GARCIA
Sekretario: S-ro LUIS HERNANDEZ GARCIA
Kasistino: F-ino CARMEN CONDE LABAJO
Vicsekretario: S-ro JACINTO URUEÑA ANTON
Voĉdonanto: S-ro PEDRO NUEZ PEREZ
Voĉdonanto: S-ro VICTOR ORTIZ GRATAL
Voĉdonanto: S-ro FRANCISCO ZARAGOZA RUIZ
Voĉdonanto: S-ro ADONIS GONZALEZ MEANA
Voĉdonanto: S-ro TOMAS CASPE CEREIJO

PREZIDANTOJ DE LA SEKCIOJ

Blindula (H. E. Auroro)	S-ro Francisco García López
Fervojista (H. E. F. A.)	S-ro Ramón Giménez Feliú
Turisma (H. T. E. S.)	F-ino Inés Gastón
Junulara (H. E. J. S.)	S-ro Jordi Ferré i Martínez

HONORAJ PREZIDANTOJ

D-ro Rafael Herrero Arroyo (+)
D-ro Miguel Sancho Izquierdo

HONORAJ MEMBROJ

S-ro Félix Díez Mateo
S-ro Camilo Veiga Prego
Prof. D-ro Ivo Lapenna
S-ro Rafael Fiol Paredes
S-ro Mariano Cantalapiedra Nieto

Ĉefdelegito de U. E. A.: S-ro. JUAN AZCUENAGA VIERNA
Ĉefredaktoro de BOLETIN: S-ro SALVADOR ARAGAY

MURCIA, SIDEJO DE LA KONGRESO

Karaj gesamideanoj, kiuj venas al Murcio por ĉeesti, labori kaj amuziĝi dum la XLI-a Hispana Kongreso de Esperanto, bonvolu akompanu min dum viaj liberaj horoj, mi montros al vi, iom skize, la mirindaĵojn kaj monumentojn de tiu ĉi bela urbo kun ĝia folkloro, situacio kaj priskribo de ĝia historio.

Tiu ĉi regiono kuŝas sur la S. Orienta parto de Hispanio. Dum la pratempo alvenis la fenicoj kiuj ekspluatis la ĉi tiean mineralan riĉecon kun samtempa regado sur la tuta marbordo. Poste la kartaganoj faris el tiu ĉi teritorio la centron de siaj konkeroj kun la urbo Kartageno kiel kerno de sia superregado. Post la romanoj alkuris la vandaloj kaj visigotoj. Fine kaj laste, en la VIII-a jarcento, la tuta regiono estis okupita de la araboj kiuj dum plural jarcentoj kunvivadis kun la indiĝenoj postlasante tre gravan influon, tiel en la kunfandiĝo de genezaj sangoj kiel en la ekonomio kaj kulturo.

Murcia fondiĝis kiel popolamaso urbo en la jaro 831-a, apud la rivero Segura, tuj post la unua jarcento de la muzulmana invado de nia lando. La akvo de tiu rivero fluis kaj ankoraŭ fluas tra la longegaj kaj multnombraj kanaletoj fositaj de muzulmanoj kaj indiĝenoj por irigacio de la kvaŝa ĝardeno Murcia bedaro. En

la XVII-a jarcento okazis tre profunda renovigo kun elstaraj teknikaj progresoj en la kampo de la kulturo kaj ekonomio. Tiutempe elstaris la eksterordinaraj personecoj de Belluga, Floridablanca, Salzillo... tiu lasta postlasis tiel gravan kolekton da skulptaĵoj ke ĝi okupis tutan muzeon.

Mirindan panoramon havas antaŭ si tiu ĉi urbo, konsistantan el unu el la plej belaj fruktĝardenoj de la tuta Eŭropo, kuŝantan laŭlonge de la rivero Segura.

De Alcantarilla ĝis preskaŭ la enfluo en la Mediteraneon ĝi aspektas kiel centkilometra tapiŝo je milnuancaj buntaj ornamaĵoj el la plej diversaj fruktoj, legomoj, floroj kaj la ĉie dissemiĝintaj vitolaŭboj.

La klimato en tiu ĉi urbo estas milda dum la vintro. La printempa sezono daŭras preskaŭ la tutan jaron, krom la somero, kies varmece akriĝas dum la tagmezo kiam la suno furiozas kaj ekscitite radias kun pikantaj strioj; sed por la murcianoj estas bonvena tiu varma vetero, ankaŭ por vi, kara samideano, ĉar ĉiu havas la bonŝancon haŭte bruniĝi sub la nudeco de la lazura tagmeza ĉielo, aŭ refreŝiĝi tra la padoj, apud la kanalaj vojetoj de la senlima bedaro, kies kanaletoj spruĉantaj ludantan akvon serpentumas inter vilaoj kaj domaroj... Poste, kiam vesperiĝas, svarmas la stratoj kaj bulvaroj



je petolema urbamaso, pleniĝas la terasoj kaj la vendistoj de glaciaĵoj profite sin okupas.

Inter ĝiaj monumentoj kaj pro sia majesteco elstaras en Murcia la Katedralo, arkitektura juvelo

kiun plej ŝatas la tuta murcia-
naro. Komenciĝis ĝia konstruado
en la jaro 1394-a sur la moskeo
Aljamade de la tiamu muzulma-
na Murcia; ĝia fasado altiras la
atenton de ĉiu preterpasanto

kiu ekstaze aŭ gape admiras ĝin, laŭ sia spiritostato. Venu, amiko, ni iru al Muzeo de Salzillo, tie vi trovos la plej delikatajn skulptaĵojn de lia grandioza skulpturo, rigardu kaj atentu la doloran mienon de tiu Sankta Virgulino. Ne preterpasu ne ĝuinte la delikatan senton de tiu dekduo de apostoloj ĉe la tablo, kun Jesuo en la mezo, serena malgraŭ la amara momento; eble vi ekkonas pro liaj fizionomiaj trajtoj tiun kiu iom poste perfidis per unu kiso sian plej bonkoran amikon. Tamen, se vi deziras vidi ilin preskaŭ vivantaj, revenu dum la Sankta Semajno kiam ĉiu el liaj figuroj meritas specialan atentan observadon.

Daŭrigu vian promenadon kaj vi renkontos vizitindajn monumentojn kiel la preĝejojn de San Esteban, de la Merced kaj de San Agustín; la Episkopan Palacon, la Teatron Romea; la Universitaton, la muzeojn de la Katedralo, de Arkeologio kaj de Tipaj Folkloraj Kostumoj. Ekster Murcia, la Sanktejon de la Fuensanta, patronino de Murcia. Pli ekstere, la Malgrandan Maron kaj ĝian ĉirkaŭaĵojn sed tio meritas apartan ĉapitron, tamen vi havos la bonŝancon, per la tuttaga ekskurso, konatiĝi kun tia pitoreska ĉarmo.

Kaj ĉar vi restadas kelkajn tagojn en Murcia, ne forgesu ĝui ĝiajn gastronomiajn pladojn, speciale tiun de «Ripoj de ŝafido kun terpomoj kaj saŭco de kabana ajlo», «Viandaj kukoj kovritaj per bakitaj vafloj kaj remburi-taj per hakita viando»... ne leku viajn lipojn, eble vi malsatas. La


murciaj kolbasoj, pro sia ĝuste spicita miksaĵo, meritas tutlandan rekonon kaj tial ke vi estas ĉi tie, gustumu la «Someran popolan salaton», freŝan, malvarman, enhavantan ĉiajn legomojn kiel kukumon, lakturon, tomaton k. t. p., ĝi estas malkara sed tre bona.

Mi ne volas preterlasi la Folkloron kiu en tiu ĉi regiono estas tipe bela kaj ĝuinda. La folkloro popolkantaro plenigas jarcentojn da popolaj tradicioj kaj la trajtoj de ĝiaj loĝantoj aperas per malnovaj kantoj. Specialaj estas tiu de la terkulturisto, en kiu ĉiu peniga laboro havas sian propran kanton; kaj tiu de la draŝisto, kiu kantas sub la sunaj radioj de la tagmezo akompanate de la monotona grincado de la nelacigeblaj cikadoj.

Sed super ĉiuj elstaras la popolkantaro «Panoĉo» kun ĝenerale, strofoj el kvar versoj oksilaba; kelkaj el tiuj strofoj devenas de tre malnova epoko, de araba poezio, de tiamaj verkistoj kiel Ibn-Chafadeh, Al-maccari kaj aliaj. La «Parranda» simila al «segidilja» estas kanto kastila kiu propiĝis al si nomon kies etimologio estas araba kaj signifas ĝuadfeston. Dum via restado en Murcia vi povos vidi kaj juĝi pri la dancoj kaj kantoj de tiuj multnombraj grupoj de la folkloro regiono kiuj per gitaroj, kastanjetoj kaj plektrgitarretoj plenigos programeron de la XLI-a Hispana Kongreso de Esperanto.

Bonvenon al Murcia.

José M-a Bernabéu Franco



ESPERANTO EN TURISMO

En la historio de la strebadoj por Esperanto ĉe la interŝtataj organizaĵoj troviĝas nur tri kazoj de alpreno de pozitiva decido favore al la internacia lingvo.

La unua estas la allaso de Esperanto kiel «lingvo klara» en telegrafio, fare de la Konferenco de Unio Internacia de Telekomunikado (Parizo, 1925). La decido aplikis rekomendon de la Ligo de Nacioj, kiu —siavice— rezultis en multjara klopodado de pluraj ŝtataj delegacioj, iniciatita de Edmond Privat.

La dua estas la konata rezolucio de la Ĝenerala Konferenco de Unesco (Montevideo, 1954), laŭ formala propono de Meksiko; propono rezultanta el la Peticio de UEA kaj iniciatita de Ivo Lapenna.

La tria estas la paragrafo pri Esperanto adoptita de la Monda Turisma Konferenco (Manilo, 1980), en la kadro de sia Deklaracio, laŭ propono de Hungario kaj iniciato de Marton Lengyel, kiun helpis G. C. Fighiera.

Konsiderante ĉi tie nur ĉi-lastan decidon, ĉar ĝi postulas tujan konkretan sekvon, ni unue memoru, ke ĝia teksto kaj la koncernaj komentoj jam aperis en la Movada gazetaro.

Temas nun pri tio, ke per komuna laboro kaj insistaj alpaŝoj ni atingu ĝian aplikon.

En si mem, la deklaro pri Esperanto havas sole valoron de morala rekono, sed tia rekono, unuanime akceptita de interŝtata konferenco, kiu reprezentis 107 registarojn, havas tre grandan, nediskuteblan aŭtoritaton. Ĝi liveras al ni prestigan motivon, por peti al la decidopovaj instancoj de la turisma mondo, nacie kaj internacie, precizajn enkondukojn de la internacia lingvo en la internacian vivon.

Praktike, kaj adaptante la sugestojn de UEA, en Hispanio la sinturnoj de la Esperanto organizaĵoj al la menciitaj instancoj povus alpreni jenajn formojn:

- estus utile, ke la nacia organizo, HEF, petu la naciajn turismajn instancojn —kiel IBERIA, RENFE kaj la Ŝtatestrekarion por turismo— ke ili eldonu afiŝojn, broŝurojn, faldfoliojn kaj ĉian informan materialon ankaŭ en Esperanto kaj malfermu kursojn de Esperanto por siaj respektivaj oficistoj;
- estus oportune, ke la lokaj Esperanto-Societoj submetu al la regionaj, provincaj kaj lokaj turismaj oficejoj —same kiel al la fakaj turismaj lernejoj kaj fakultatoj— la koncernajn suprajn proponojn.

Pri la plej taŭga rilat-maniero kun la menciitaj instancoj, ĉiu decidu mem. Gravas, tamen, atenti du demandojn:

Unue. Por atingi maksimuman efikecon, la argumentado prefere estu sobra kaj konciza kaj baziĝu ne nur sur la Manila Deklaracio, sed ankaŭ sur la informoj pri Esperanto kaj turismo entenitaj en «Esperanto en Perspektivo» kaj aliaj verkoj. Tiurilate, la preparo de komuna dokumento pri la temo fare de HEF aparte helpus la komunajn klopodojn.

Due. La vojoj, laŭ kiuj okazu la kontaktoj kun la turismaj aŭtoritatoj, estu zorge planata. Skriba, trafa kaj bone dokumentita sinturno sendube influas, sed ĝiaj ŝancoj de sukceso pliiĝas, se ĝin apogas personaj vizitoj, rekomendo flanke de eminentulo kaj interparolo.

La Manila Deklaracio malfermas al Esperanto novajn perspektivojn. La Movado ne maltrafu tiun-ĉi ŝancon.

REZOLUCIO DE MONTEVIDEO RILATE AL ESPERANTO

La Rezolucio, akceptita de la Pleno de la Ĝenerala Konferenco de la UNESKO la 10-an de decembro 1954-a, kiel ĝi aperas en la dokumento **Rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko** (Res. IV.1.4.422 p. 36) Montevideo 1954, tekstas:

«La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favore al Esperanto;

Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

Notas, ke pluraj Ŝtatoj Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurentan evolucion en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn».

XLI-a HISPAN



KONGR

Vendredo 17-an

- 17 h. Disdonado de dokumentoj
- 19 h. Interkona Vespero

Sabato 18-an

- 9 h. Ekzamenoj (Elementa kaj Supera)
- 9 h. Kunsido de la estraro de H. E. F. kun delegitoj de Grupoj kaj sekcioj.
- 12 h. Solena Malfermo de la Kongreso.
Festparolado de S-ro G. L. Smith (Prezidanto de Brita E. Asocio).
Oficiala Foto.
- 20 h. Prelego en esperanto de S-ro Antonio Alonso Núñez pri la temo «Einstein en la ĉiutaga lingvo».
- 22,30 h. Pola Esperanto Teatro prezentas la dramon «Malfermu la pordon».

Dimanĉo 19-an

- 9,30 h. Sankta Meso en la Universitata Preĝejo.
- 11 h. Folkloro Presentado.

IA KONGRESO DE ESPERANTO

ĜENERALA PROGRAMO

RESEJO: Universidad de Murcia (17-22-an Julio 1981-a)

19 h. Arta Vespero.
21 h. Murcia festo.

Lundo 20-an

8 h. Tuttaga ekskurso al la «Mar Menor».
21 h. Projekcio de esperantaj filmoj.

Mardo 21-an

9 h. Vizito al la diversaj Muzeoj de Murcia.
11 h. Fakaj kunvenoj (H. E. J. S., I. L. E.I., H. E. F. A., «Antón Balagué» k. t. p.)
12,30 Ĝenerala Kunsido de H. E. F.
18 h. Seminario pri la temo «Esperanto, lingvo de amikeco».
19,30 h. Hispanlingva prelego.
21,30 h. Oficiala Bankedo.

Merkredo 22-an

9 h. Duontaga ekskurso al la Sanktejo Fuensanta.
17 h. Solena Fermo de la Kongreso kaj disdonadoj de premioj kaj atestiloj.

RIMARKOJ:

Dum la kongrestagoj funkcios en la kongresejo Libroservo de H. E. F.

NIAJ ĈIJARAJ PRELEGANTOJ

Antonio Alonso Núñez



Esperantisto de antaŭ 34 jaroj.

Licenciulo pri Matematiko kaj pri komercaj studoj.

Privata instruisto (preparado al universitata nivelo).

Profesoro de la Esperanto-kurso de «Instituto de Idiomas» (Filología
Fakultato, Santiago de Compostela).

Ŝtata statistikisto.

Pretigis provan malneton pri «Trimonata Antaŭuniversitata Somerkurso
pri Matematiko, Fiziko, Kemio» (pri kio, ankaŭ, temos la kolokvo
post lia prelego).

La duobla fono de unu kongresa prelego:

EINSTEIN EN ĈIUTAGA LINGVO

La relativec-teorio, naskiĝinta
en la genia cerbo de Einstein,
inundas nian vivon per siaj gran-
degaj rezultoj: ĉu ne sufiĉus citi

la atombombon aŭ —sur tereno
ne tiom tragika— la atomkernan
energien?

Nu, en la kulturo de ĉiu mez-

klera homo ni certas trovi sufiĉe bonajn kaj taŭgajn ideojn pri la multiplika tabelo, pri la gravita reciproka altiro inter astroj k. t. p., k. t. p., Kiel eblas, do, ke ne same okazas pri la ejnstejna (Einstein-a) teorio, se ni konsideras ĝian eksterordinaran gravecon por ni ĉiuj?

Oni daŭre respondas al ni ke tio ŝuldiĝas al la ekstreme matematika kaj abstrakta naturo de tiu teorio ke nur inteligente privilegiiitaj mensoj kapablas ĝin kompreni.

Ne estas, tial, strange ke tiuj ni ne apartenantaj al tiu privilegia klaso, kaj tamen forte dezirante informiĝi pri tiu teorio, avida manĝas ĉiun vulgarigan —foje eĉ seriozan— libron pri la temo, kun senpacienca aspiro al klaraj ideoj. Kiom da tiaj libroj, kara kunkongresano, vi jam legis: unu, du, kvin, dek, eble eĉ dudek? Ĉu vi finfine venis al klaraj ideoj, taŭgaj por la nivelo de tiu citita mezklera homo?

Oni ĝenerale kunsentas ke por atingi tian nivelon estas necese kaj sufiĉe, kontentige respondi al jenaj du demandoj:

1-e) Kion oni devas kompreni sub la vorto «kompreni» kiam oni ĝin uzas en Relativec-teorio?

2-e) Kiuj estas la plej baze bazaj ideoj de la ejnstejna konstruaĵo, tiel ke, koninte ilin, tiu mezklera homo jam ili «komprenis» kaj poste povas tute trankvile decidi ĉu plu studi la teorion aŭ ne, tamen jam sen ajna maltrankvilo aŭ dubo, ĉar li scias, ke li scias ĉion bezonatan por kontentigi sian bazan malkvieton rilate ĉi tiun temon?

Ĉar okaze de la Renkontiĝo de la portugala amikaro en Porto (1979-a) ili bonvole permesis al mi prezenti la temon dum dek minutoj (plus kolokveto) mi povis konfirmiĝi ke la irenda vojo troviĝas en la respondo al tiuj demandoj.

Tial, por paroli pri tiu sama temo, tamen iom pli amplekse kaj perfekte (kvankam ne pli komplike), mi havos la honoron prelegi antaŭ vi.

La dua fono rilatas al multjara revo mia: Perioda okazigo de «Trimonata Antaŭuniversitata Somerkurso pri Matematiko, Fiziko, Kemio» por junaj esperantistoj el ĉiuj landoj kun internacia profesorado.

Kompreneble, la celo estus per Esperanto helpi internacian junularon en sia paŝo de abiturienteco al universitata nivelo. Sed mi ne rajtas okupi tie ĉi pli da spaco; la planon mi prezentos al vi dum la kolokvo. Mi finu per nuraj du aldonajetoj:


a) La nuna prelego estos simpligita kaj parteto el la «Kajero pri Relativec-teorio» de tiu dezirata Somerkurso.

b) En la kolokvo mi parolos al vi pri ĉefaj aproboj ricevitaĵoj de Hispanio, Japanio, Ukrainio, Germanio, Francio, Anglio, Usono; pri tiu por mi doloriga Universala Kongreso (Madrid 1968-a). Kaj, ĉefe, pri la emocio kiun mi spertis legante la tiucelan pledon de gesinjoroj Saheb-Zamani (Esperanto, Okt. 1980, p. 161), k. t. p. Ili plene pravas kaj tio estas la irenda vojo. Do, junaj fortoj ek la laboro!!

A. ALONSO NUÑEZ

GRAHAM LEON-SMITH, Prezidanto de la Brita Esperanto Asocio, membro de la Komitato de Universala Esperanto Asocio, Prezidanto de la komisiono de U. E. A. por Parlamenta Agado, profesie lernejestro en Londono. Li prelegos dum la Solena Inaŭguro pri «La Parlamenta Agado de U. E. A.».

D-ro ANTONIO ROLDAN PEREZ, Katedra Profesoro de Literatura Kritiko en la Universitato de Murcio, prelegos hispanlingve, pri tre interesa temo en la kadro de nia ĉijara Hispana Esperanto-Kongreso.



POLA ESPERANTO TEATRO «A. GRABOWSKI»

Laŭ iniciato de Zbigniew Dobrzyński, fondiĝis en 1970-a kun la celo popularigi polan kulturon per Esperanto en eksterlando kaj Esperanton inter la poloj.

Kalina Pienkiewicz kaj Zbigniew Dobrzyński prezentiĝos por la tria fojo antaŭ la hispana kongresanaro, ĉifoje ili prezentos la teatraĵon «**Malfermu la pordon**», de Kristoforo Choinski. La teatraĵo, prezentita unuafoje en la U. K. de Stokholmo, montras al kio povas konduki nin, homojn, la urĝo, kiu nuntempe regas la mondon.

Ni deziras al tiuj talentaj geaktoroj unu plian sukceson.

HISPANAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1.—1920	BARCELONA
2.—1921	ZARAGOZA
3.—1923	VALENCIA
4.—1924	BILBAO
5.—1925	CORDOBA
6.—1926	MADRID
7.—1928	SEVILLA
8.—1929	OVIEDO
9.—1930	MADRID
10.—1933	SANTANDER
11.—1936	BARCELONA
12.—1951	TARRASA
13.—1952	VALENCIA
14.—1953	BILBAO
15.—1954	ZARAGOZA
16.—1955	GIJON
17.—1956	BARCELONA
18.—1957	MADRID
19.—1958	CASTELLON DE LA PLANA
20.—1959	MALAGA
21.—1960	PONTEVEDRA
22.—1961	PALMA DE MALLORCA
23.—1962	VALLADOLID
24.—1963	BARCELONA
25.—1964	VALENCIA
26.—1965	PALENCIA
27.—1966	BILBAO
28.—1967	ZARAGOZA
29.—1969	LA LAGUNA
30.—1970	MIERES
31.—1971	ALICANTE
32.—1972	VIGO
33.—1973	MADRID
34.—1974	VALLADOLID
35.—1975	LERIDA
36.—1976	EL FERROL
37.—1977	SABADELL
38.—1978	LEON
39.—1979	GIJON
40.—1980	MADRID
41.—1981	MURCIA

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

- | | | | |
|----------|---------------------------------------|----------|------------------|
| 1.—1905 | Boulogne sur Mer (F) | 34.—1949 | Bournemouth (GB) |
| 2.—1906 | Géneve (CH) | 35.—1950 | París (F) |
| 3.—1907 | Cambridge (GB) | 36.—1951 | München (D) |
| 4.—1908 | Dresden (D) | 37.—1952 | Oslo (N) |
| 5.—1909 | Barcelona (E) | 38.—1953 | Zagreb (YU) |
| 6.—1910 | Washington (USA) | 39.—1954 | Haarlem (NL) |
| 7.—1911 | Antwerpen (B) | 40.—1955 | Bologna (I) |
| 8.—1912 | Krakow (PL) | 41.—1956 | Kopenhaven (DK) |
| 9.—1913 | Bern (CH) | 42.—1957 | Marseille (F) |
| 10.—1914 | París (F). Ne okazis
pro la milito | 43.—1958 | Mainz (D) |
| 11.—1915 | San Francisco (USA) | 44.—1959 | Warszawa (PL) |
| 12.—1920 | Den Haag (NL) | 45.—1960 | Bruselo (B) |
| 13.—1921 | Praha (CS) | 46.—1961 | Harrogate (GB) |
| 14.—1922 | Helsinki (SF) | 47.—1962 | Kopenhaven (DK) |
| 15.—1923 | Nürnberg (D) | 48.—1963 | Sofía (BG) |
| 16.—1924 | Wien (A) | 49.—1964 | Den Haag (NL) |
| 17.—1925 | Géneve (CH) | 50.—1965 | Tokio (J) |
| 18.—1926 | Edinburgh (GB) | 51.—1966 | Budapest (H) |
| 19.—1927 | Danzing | 52.—1967 | Rotterdam (NL) |
| 20.—1928 | Antwerpen (B) | 53.—1968 | Madrid (E) |
| 21.—1929 | Budapest (H) | 54.—1969 | Helsinki (SF) |
| 22.—1930 | Oxford (GB) | 55.—1970 | Wien (A) |
| 23.—1931 | Krakow (PL) | 56.—1971 | London (GB) |
| 24.—1932 | París (F) | 57.—1972 | Portland (USA) |
| 25.—1933 | Koln (D) | 58.—1973 | Beograd (YU) |
| 26.—1934 | Stockholm (S) | 59.—1974 | Hamburgo (D) |
| 27.—1935 | Roma (I) | 60.—1975 | Kopenhaven (DK) |
| 28.—1936 | Wien (A) | 61.—1976 | Athinai (GR) |
| 29.—1937 | Warszawa (PL) | 62.—1977 | Reykjavik (IS) |
| 30.—1938 | London (GB) | 63.—1978 | Varna (BG) |
| 31.—1939 | Bern (CH) | 64.—1979 | Luzerno (CH) |
| 32.—1947 | Bern (CH) | 65.—1980 | Stockholm (S) |
| 33.—1948 | Malmö (S) | 66.—1981 | Brasília (BR) |
| | | 67.—1982 | Antwerpen (B) |

Por koncizeco la landoj estas indikitaj
laŭ la internaciaj aŭtomobilaj simboloj.

ESPERANTO EN LA RADIO

- Ĉiutage** : De la 5-a ĝis 5,30; ĝis 16-a;
21,30 ĝis 22 RADIO VARSOVIO
De 11-a ĝis 11,30; 13-a ĝis
13,30; 20-a ĝis 20,30 RADIO PEKINO
- Dimanĉe** : De 5,45 ĝis 5,55-a RADIO VIENO
De 20-a ĝis 20,20-a RADIO ROMO
De 20,50 ĝis 20,15-a RADIO VATIKANA
De 23-a ĝis 23,15-a RIO DE JANEIRO
- Lunde** : De 0 h. ĝis 1-a RADIO SOROKABA
De 18-a ĝis 18,10 kaj de 22-a
ĝis 22,10-a RADIO BERNO
- Marde** : De 22,45-a ĝis 23-a RADIO ZAGREBO
- Merkrede** : De 21,30-a ĝis 21,45-a RADIO SABADELL
- Ĵaŭde** : De 6,10-a ĝis 6,30-a RADIO VATIKANA
De 17,50-a ĝis 17,55-a RADIO VIENO
De 18-a ĝis 18,10 kaj 20,30
ĝis 20,40-a RADIO BERNO
- Sabate** : De 20,30-a ĝis 20,45-a LA VOZ DE VALENCIA
De 16,45-a ĝis 16,55-a RADIO VIENO
De 18-a ĝis 18,10 kaj 20,30
ĝis 20,40 RADIO BERNO

Tiuj ĉi horaroj estas laŭ la Greenwiĉa meridiano.

EBLECOJ DE AŬSKULTADO EN EŬROPO:

- RADIO BERNO per ondoj 6.165 kaj 9.535 KHz. (48,66 kaj 31,46 m).
RADIO PEKINO per ondoj de 6.860 kaj 9.380 KHz (43,73 kaj 31,98 m).
RADIO VATIKANA per ondoj de 11.715 KHz. (25,61 m).
RADIO VIENO per ondoj de 6.155 kaj 9.770 KHz. (48,74 kaj 30,71 m).

Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: RADIO ROMO, RADIO VARSOVIO kaj RADIO ZAGREBO.

LISTO DA GEKONGRESANOJ

- | | | |
|-----|-----------------------------|--------------------|
| 1. | Francisco Zaragoza Ruiz | Callosa del Segura |
| 2. | Josette Braem de Zaragoza | Callosa del Segura |
| 3. | Restituto Alberó García | Valencia |
| 4. | Francisco Sánchez Antón | Alicante |
| 5. | Dolores González Peraba | Alicante |
| 6. | Luis Hernández | Valladolid |
| 7. | María Rafaela Urueña | Valladolid |
| 8. | María Balsedó Lledó | Alicante |
| 9. | Soledad Sabater Jover | Alicante |
| 10. | Fco. Miguel Muñoz Garre | Alquerías (Murcia) |
| 11. | Madrida Esperanto Liceo | Madrid |
| 12. | Augusto Casquero de la Cruz | Madrid |
| 13. | José María Bernabeu Franco | Callosa del Segura |
| 14. | Dolores Egea de Bernabeu | Callosa del Segura |
| 15. | José Miguel Bernabeu | Callosa del Segura |
| 16. | Inmaculada Bernabeu Egea | Callosa del Segura |
| 17. | Grupo Esperanto de Callosa | Callosa del Segura |
| 18. | Antonio Sánchez Velda | Callosa del Segura |
| 19. | Dolores Serrano Gilabert | Callosa del Segura |
| 20. | Vicente Molins Reig | Callosa del Segura |
| 21. | José Miguel Armelles | Elche |
| 22. | Manuel López Serna | Alicante |
| 23. | Concha Hernández Sabater | Alicante |
| 24. | Manuel López Hernández | Alicante |
| 25. | Concha López Hernández | Callosa del Segura |
| 26. | Alvaro M. Mellado López | Callosa del Segura |
| 27. | Ezequiel Mellado López | Callosa del Segura |
| 28. | Zaida Mellado López | Callosa del Segura |
| 29. | Gian Carlo Fighiera | Madrid |
| 30. | Ada Fighiera-Sikorska | Madrid |
| 31. | Grupo Fido Kaj Espero | Valladolid |
| 32. | Ismael Muñoz Garre | Alquerías (Murcia) |
| 33. | José Ramón López Tejerina | Madrid |
| 34. | Vicente Hernández Llúsera | Sabadell |
| 35. | Magdalena Royo Cruellas | Sabadell |
| 36. | Luis Serrano Pérez | Sabadell |
| 37. | José Sala Campamá | Sabadell |
| 38. | Carmen Sanvicente Brosa | Sabadell |

- | | | |
|-----|--|-----------------------|
| 39. | Teresa Gabarra Sala | Sabadell |
| 40. | José M. Serés Ubach | Cervera (Lérida) |
| 41. | Carlos N. Moya Seguí | Valencia |
| 42. | Juana Hernández de Deu | Sabadell |
| 43. | Juana Deu Hernández | Sabadell |
| 44. | Centro de Esperanto Sabadell | Sabadell |
| 45. | Ramón Molera Pedrals | Moya (Barcelona) |
| 46. | Antonia Urgelles | Moya (Barcelona) |
| 47. | Jaume Molera Urgelles | Moya (Barcelona) |
| 48. | Pascual Gil Figuer | Barcelona |
| 49. | Antonia Lapuerta Palacios | Zaragoza |
| 50. | Joaquín Bielsa Vispe | Zaragoza |
| 51. | Angelines Lázaro de Bielsa | Zaragoza |
| 52. | María Luisa Nine Mexia | Lisboa (Portugal) |
| 53. | Grupo Esperantista de Alicante | Alicante |
| 54. | Rosa María Navarro González | Alquerías (Murcia) |
| 55. | Feliciano Olivan Guin | Zaragoza |
| 56. | Salvador Aragay Galbany | Barcelona |
| 57. | Josefina Girona | Barcelona |
| 58. | Carlos Aragay Girona | Barcelona |
| 59. | Jaime Aragay Pujols | Barcelona |
| 60. | Rosa Galbany Cusido de Aragay | Barcelona |
| 61. | Antonio Almeida | Amadora (Portugal) |
| 62. | Olga Almeida | Amadora (Portugal) |
| 63. | Evaristo Gil Pallarés | Barcelona |
| 64. | Miguel Martínez Marín | Zaragoza |
| 65. | María Teresa Carnicer | Zaragoza |
| 66. | Sergio Docal Puig | Florida (USA) |
| 67. | Ernesto Roca Genescá | Tarrasa (Barcelona) |
| 68. | Joventut Terrassenca, E-to Fako
de la S. C. | Tarrasa (Barcelona) |
| 69. | Gonzalo García Alvaro | Madrid |
| 70. | Juan Carlos Ruiz Sierra | Madrid |
| 71. | Carmen Dávila Buitrón | Madrid |
| 72. | Maribel Alonso Marín | Madrid |
| 73. | Fernando Costa | Matosinhos (Portugal) |
| 74. | Luis Sebastián de Otaola y Faón | Bilbao |
| 75. | Julián L. Morales | Bilbao |

76.	José Fernández Arroyo	Madrid
77.	Dolores Juan Merino	Madrid
78.	Clementina Tranque Iglesias	Valladolid
79.	Mercedes Tranque Iglesias	Valladolid
80.	Carolina Codorniu Bosch	Churra (Murcia)
81.	Angel Mañero González	Valencia
82.	María Teresa Martí Monfort	Valencia
83.	José Ivern Mass	Barcelona
84.	Ana M ^o Hernández-Ros Codorniu	Cartagena (Murcia)
85.	Federico Soubrier Zarandona	Cartagena (Murcia)
86.	Giordano Moya Escayola	Tarrasa (Barcelona)
87.	Jacinto Urueña Antón	Valladolid
88.	Carmen Alvarez López	Valladolid
89.	Angel Díez García	Valladolid
90.	Paulina Prieto San José	Valladolid
91.	Carmen Conde Labajo	Valladolid
92.	Manuel Alcubilla Gallardo	Madrid
93.	José Arroyo García	Cartagena (Murcia)
94.	Ricardo-Felipe Albert Reyna	Málaga
95.	Félix Gómez Martín	Madrid
96.	Julia de la Cueva Gómez	Madrid
97.	Antonio Marco Botella	Zaragoza
98.	Pilar Sayarte Villarba	Zaragoza
99.	Abel Freire de Oliveira	Lisboa (Portugal)
100.	María Amelia Freire de Oliveira	Lisboa (Portugal)
101.	Jesús Pérez Caballero	Barcelona
102.	Manuel Camañes Esteban	Barcelona
103.	José Guitart Escudero	Barcelona
104.	Adela Gomila de Guitart	Barcelona
105.	Fomento Martinense - Esperanto	
	Fako	Barcelona
106.	José Ferrer Serrano	Barcelona
107.	Ana Mongay de Ferrer	Barcelona
108.	Mikaelo Nogués Liurana	Barcelona
109.	Henriko Padrós Casanova	Barcelona
110.	Johano Oraper Rourich	Barcelona
111.	Enrique Arnau Prosper	Cheste (Valencia)
112.	Francisco Manzanera Tarín	Cheste (Valencia)
113.	Ovidio Estese Debon	Cheste (Valencia)
114.	FRATECO Esperanto Societo	Zaragoza
115.	Herminia Gil Alvarez	Zaragoza

- | | | |
|------|-----------------------------------|------------------------|
| 116. | Celestino Pousa Veloso | Vigo (Pontevedra) |
| 117. | Julio Bueno Cortés | Vigo (Pontevedra) |
| 118. | Josefina Fernández López | Vigo (Pontevedra) |
| 119. | Grupo Esperantista «Paco kaj Amo» | Vigo (Pontevedra) |
| 120. | José Carlos Quintas Montero | Vigo (Pontevedra) |
| 121. | Rosa Costas Pastero | Vigo (Pontevedra) |
| 122. | Pilar Montenegro Sanjurjo | Vigo (Pontevedra) |
| 123. | Pío Moa Banga | Vigo (Pontevedra) |
| 124. | Jaime Canoa González | Vigo (Pontevedra) |
| 125. | Miguel Manteca López | Madrid |
| 126. | Rufina Cano Salado | Madrid |
| 127. | Astura Esperanto Asocio | Gijón |
| 128. | Sacramento Collado Llana | Gijón |
| 129. | Adonis González Meana | Gijón |
| 130. | María Pilar Alonso Moro | Gijón |
| 131. | José García Alvarez | Aboño-Carreño (Oviedo) |
| 132. | Julio Argüelles García | Gijón |
| 133. | Isabel García Méndez | Gijón |
| 134. | Leontic Branka | Sabac (Yugoslavia) |
| 135. | Manuel Fernández Juárez | Gijón |
| 136. | Maite Viar Isermi | Gijón |
| 137. | Gervasio Colunga Fernández | Gijón |
| 138. | Matilde Pimentel López | Almería |
| 139. | Eduardo Larrouy López | Bilbao |
| 140. | Carmen Norabuena de Larrouy | Bilbao |
| 141. | Francisco Aliaga Rocafull | Puebla de Vallbona |
| 142. | Lilija Koleva Pavlova | Sofía (Bulgaria) |
| 143. | Moisés Martí Junyer | Palma de Mallorca |
| 144. | Alfonso-Henr. Rodríguez Herdez. | Lisboa (Portugal) |
| 145. | Maribel Soriano Marco | Azuara (Zaragoza) |
| 146. | José Antonio Fleta Zaragozaño | Azuara (Zaragoza) |
| 147. | Víctor Ortiz Gratal | Zaragoza |
| 148. | Agustín Blasco Rosado | Madrid |
| 149. | Florencia Zamorano Fernández | Madrid |
| 150. | Carlos Castañón Adalia | Valladolid |
| 151. | Ramón Martí Sanz | El Puntal (Sevilla) |
| 152. | Rosa Blay Calatayud | El Puntal (Sevilla) |
| 153. | María Teresa Martí Blay | El Puntal (Sevilla) |
| 154. | Marifé Sanz Teruel | El Puntal (Sevilla) |
| 155. | Salomé Sancho Rebullida | Zaragoza |
| 156. | Fernando Soler Valls | Valencia |

157.	Herminia Sempera Monzó	Valencia
158.	Conchita Soler Sempere	Valencia
159.	Fernando Soler Adelantado	Valencia
160.	José-Fernando Soler Sempere	Valencia
161.	Argentina García Ceñal	Gijón
162.	Santiago Mulas Gallego	Gijón
163.	Florencia Sánchez Villar	Gijón
164.	Marina Piquero Muñiz	Gijón
165.	María Luisa Corujo	Gijón
166.	Libert Puig Gandía	Sabadell (Barcelona)
167.	Carme Cánovas Baños	Sabadell
168.	Francisca J. de Yruegas del Río	Madrid
169.	Rafael Palacios Herranz	Bilbao
170.	María Luisa San Martín	Bilbao
171.	Domingo Domenech Savall	Valencia
172.	Elías Domenech Savall	Valencia
173.	Micaela García Moreno	Valencia
174.	Victoria Altesé Lamagna	Sabadell
175.	Rodolfo Canet Marín	Alicante
176.	Etelvina Castelló	Alicante
177.	José Damián Canet	Alicante
178.	Rodolfo Canet	Alicante
179.	Enrique Canet	Alicante
180.	María Jesús Canet	Alicante
181.	Amelia Canet	Alicante
182.	Frederiko Alberich Jofré	Barcelona
183.	Miguel Angel Sancho Pardo	Madrid
184.	José Carlos Chapuli Motta	Navia (Asturias)
185.	Charo González Díaz	Navia (Asturias)
186.	Carolina Chapuli González	Navia (Asturias)
187.	Eduardo Chapuli González	Navia (Asturias)
188.	Jorge Chapuli González	Navia (Asturias)
189.	José Carlos Chapuli González	Navia (Asturias)
190.	Antonio Juan Medrano	Alicante
191.	María Aurora Fombella	Gijón (Asturias)
192.	José Palmero Pérez	La Laguna (Tenerife)
193.	Luis Gomer Domenech	Barcelona
194.	Rosa Bergua Allúe	Barcelona
195.	Luis María Hernández Yzal	Sant Pau D'Ordal (Barcelona)
196.	Teresa Messana Rafols	Sant Pau D'Ordal (Barcelona)
197.	Lourdes Gutiérrez Catalán	Barcelona
198.	Faustina Martínez Guillem	Sant Pau D'Ordal (Barcelona)

LA ESPERO

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento
Komprenante unu la alian,
La popolo faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben'efektiviĝos.

L. L. ZAMENHOF



CAJA DE AHORROS PROVINCIAL
DE MURCIA

